ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 9

Septembro 2016 Kol.377/32

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo:** Raportaĵo el UK Nitra, 68-a IFEF kongreso en Bulgario, Vilaĝo Esperanto en Pollando, Nova honora membro UEA, Ondina malbeno, Tristaj anoncoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Travivaĵoj el 101-a Universala kongreso UEA en slovakia urbo Nitra



Ni, kiuj ne havis eblon partopreni kongreson en slovakia Nitra, ni povas vere bedaŭri. Havi tiom da avantaĝoj, rabatoj en taksi-aŭtoj, senpage veturi per busoj, povi danci sur la placo, fermi la ŝoseon por

grandioza marŝparado, kvazaŭ ĉiuj volus similigi karnavalon en Bra-



zilo — organizi koncertojn sur la placo, ke eble ĝis nun neniuj organizantoj de la kongresoj povis tiom propagandi Esperanton. Ni povas nur gratuli al tiuj, kiuj ĉion tiel bonege elpensis kaj povis realigi.

La semajnon inter 23. 7. ĝis 30. 7. 2016 vizitis preskaŭ 1 300 esperantistoj el 60 landoj. La programo de la kongreso estis bunta kiel



ĉiam, sed jam la unuan vesperon, kiam okazis Nacia vespero, la koncerto de profesia folklora dancensemblo Lúčnica en slovakiaj naciaj kostumoj, kiu estis prezentita sur la

placo kaj povis spekti ĝin ankaŭ ordinaraj urbanoj, (sen pagi altan sumon de enirbileto), ĉarmigis la koron de ĉiuj partoprenantoj.
Dum la Nacia vespero de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra, Slovakio, prezentis belege sian riĉan kulturon: muzikon, dancojn, kostumojn, muzikajn instrumentojn, ktp. Alloga kaj gratulinda prezentado! Pri la grupo ni estis informitaj:

**Lúčnica** estas sendube la plej fama kaj plej bona folklora ensemblo en Slovakio, fondita en la jaro 1948 en Bratislavo. Ĝi konsistas el ĥoro kaj danca ensemblo. Ĝi naskiĝis kiel "grupo de entuziasmaj junuloj asociita al la etnografia grupo Živena".
En la sama jaro ĝi prezentiĝis en Slava agrokultura ekspozicio en Prago. Post 65 jaroj da ekzisto partoprenis en ĝi pli ol 2000 homoj. Okaze de la 60-a datreveno de sia fondiĝo, fine de la jaro 2008, ĝi prezentis 11-tagan festan programon en Bratislavo.

**Movada foiro** okazis sabate antaŭvespere, kie prezentiĝis preskaŭ 100 diversaj organizoj, kluboj, asocioj kaj societoj, kiuj havis ion por montri, propagandi sian agadon aŭ produktojn. Kompreneble ankaŭ nia asocio AEH montris siajn broŝurojn, insignojn, monatan gazeton Informilo kaj ankaŭ klubo de Mladá Boleslav propagandis siajn legolibretojn.




Sed nun ni donas lokon al nia membrino el Ústí n.L., ke ŝi povu esprimi la kongreson laŭ sia opinio:

Je la 8,30 mi venis sur la straton „Ĉe la Seka kverko“ en Pardubice, eniris en la aŭtomobilon de Lenka kaj mi veturis en la seko kaj seke

ĝis la restoracio „Naŭ krucoj“ proksime de Brno, kie ni iom trinkis kaj poste daŭrigis pluen al la celo de nia vojaĝo ĝis Nitra.

Navigilo „Tereza“ veturigis min kaj miajn kunveturantinojn L.+S.+E. (mallongigo de nomoj de miaj amikinoj Lenka+Stáňa+Eva) feliĉe ĝis celo al Altlerneja studenta hejmo en Nitra. De tie ni kun elano elkuris por registri nin en la kongresejo kaj jam tie mi renkontis kelkajn konatojn. Bedaŭrinde ne ĉiujn nomojn mi ankoraŭ memoris. Dento de la tempo forigis kelkajn de ili el mia kapo.

La ĉeĥa grupo de la kongreso nombris 75 esperantistojn.



En halo de la kongresejo malfermiĝis al mi granda spaco kun multaj ebloj, ekkonoj kaj instruoj. Kion elekti el tiom da proponoj? Do mi unue rigardis en kongresan libron kaj poste en kongresan bultenon Pribina. Kiel spiritan nutraĵon mi elektis koncertojn, teatraĵojn kaj prelegojn, ekskursoj certigis la flankon fizikan.

Ĝojigis min, ke mi povis uzi mian kongresan legitimilon, pendigitan sur mia kolo, ne nur por ĉeesti kongresajn programerojn, sed ankaŭ kiel veturbileton por la loka veturado en busoj tra la urbo, sed ankaŭ por rabato en nigraj taksiaŭtoj. Tion ni uzis foje dum la pluva nokta veturo kaj la ŝoforo estis tiel bonvolema, ke li klopodis ne vidi, kiom da homoj engrimpis en lian veturilon, malgraŭ tio, ke la veturo kostis bagatelon. Ni estis kvin. Per troplena aŭto ni feliĉe venis al nia tranoktejo.

Mi ne parolos pri ĉiuj programeroj, kiujn mi vizitis, sed tamen almenaŭ pri kelkaj. Pri la grandioza unua vespero kun profesia dancgrupo Lúčnica eble skribis aliaj partoprenintoj.
Sed antaŭlasta tago de la kongreso estos bone rememorata. Ĝi komenciĝis per komuna fotado, poste per strata amasmarŝo tra la urbo kaj fine per ferma koncerto.
Mi ne povis imagi, kiel la fotografisto fotos preskaŭ tuton de 1300 kongresanojn. Sed ni estis aranĝitaj en la formojn de literoj UEA, kiel viva bildo, ekĉirkaŭflugis nin du malgrandaj senpilotaj aviadiloj (dronoj) kaj fotis nin de supro el ĉiuj vidanguloj. Ne gravis, ke la suno ĉe tio brilis en niajn vangojn kaj ni ĉe la fotado ne povis defendi nin de grimacaj mienoj. (Vidu la foton sur la unua paĝo).
Post sufiĉa fotado ni fine ekmarŝis tra la nitraaj ŝoseoj en danca ritmo de sambao, ĉe brua batado de tamburoj, aplaŭdoj kaj flirtado de flagoj kaj slogan-rubandoj kun Esperanto de surskriboj kaj simboloj. La urbo Nitra tian bruon sur la stratoj certe ankoraŭ ne travivis. Soifaj kaj lacaj ni venis al la celo sur la placo ĉe la teatro de Andreo Bagar, kie ni tuj kreis longan vicon ĉe la stando kun biero. Tiom da ĉeĥa biero en Slovakio mi neniam eltrinkis.



Sur la Placo de Svätopluk ni travivis tutan belegan vesperon. Precipe agrable min surprizis kaj entuziasmigis blinda junulo – esperantisto el Germanio, Kaŝi (veranome Carsten Schnathorst) muzikisto, pianisto kaj esperantisto, kiu mem verkis tekstojn kaj muzikojn por siaj kantoj, kiujn li tre bone kantis en Esperanto. Li forŝtelis la koron de ĉiuj partoprenantoj per sia propra emociplena kanto verkita dum la UK. Tiel ankaŭ la lasta vespero de la 101-a kongreso de UEA agrable sukcesis. Věra Štěpánová, Ústí n.L.

**Membroj de la E-mental-grupo** vigle partoprenis la kongreson. Oni povis vidi ilin kiel ordinarajn partoprenantojn, sed ankaŭ kiel

prelegantojn, kiel helpantojn: en akceptejo, en informejo, dum la ju-




nulara programo kaj en gufujo, ankaŭ kiel tradukistojn dum la ekskursoj, kiel teknikistojn.

E-mentalanoj estis videblaj ĉie. Vi vidas ilin sur la foto ĉiujn ridemajn, kiam en sia mezo ili havas la majstron Zamenhof. Ankaŭ li ricevis novan T-ĉemizon.

## Ĉu vi iam lernis danci tangon sur la granda urba placo?

La vendreda vespero sur la Svätopluk placo apartenis ĝis noktomezo al la monda esperantistaro. Ĝi komenciĝis per la provo atingi la mond-rekordon el la dancado de la slovaka tango.
Post nelonga danckurso gvidita de la dancmajstro (kun bonega traduko fare de Zuzana Kožuchová) proksimume 86 dancparoj (172 dan-



cantoj samtempe sur unu loko) dancis la tangon pli ol 20 minutojn. Laŭ la decido de la oficiala ĵurio la mondrekordo estis agnoskita, kion atestas oficiala diplomo pri tio! Do, ni vidu, kiel la esperantistaro estas eĉ dancema!

Lasta foto montras grandegan marŝantaron, kiu okazis dum antaŭlasta tago, vendrede.
Ĉefe sur kelkaj videoj estas pli multe videblaj diversaj jubilaj vangoj de multaj eksterlandaj esperantistoj, ĉar marŝi en la fremda urbo kun flagoj kaj tiel fari grandegan reklamon al Esperanto kaj ankaŭ halti trafikon de aŭtomobiloj sur la ŝoseo, ne okazas tro ofte. Plua partoprenantino Milada sendis al nia redakcio siajn opiniojn pri la kongreso: El la distrikto Pacov ĉeestis la kongreson nur du virinoj, por unu el ili tiu ĉi kongreso estis la unua, do pli ol fantazia.

Ambaŭ admiris buntan programon, teatraĵojn, ekspoziciojn, prelegojn kaj belegan ensemblon Lúčnica, nur la vetero dum la tuta semajno povus esti ne tiel tropika. Interesaj estis ankaŭ la surskriboj sur T-




ĉemizoj kaj al kelkaj demandoj Milada devis respondi, kion la surskriboj signifas. Esperanto – justa lingvo, aŭ Socia justeco – lingva justeco. Kaj poste kutime disvolviĝis diskuto je la temo, ke la sendado de la mono al evolulandoj ne estas efika. Se ili povus paroli per egala lingvo, kiu por neniu estus gepatra, la homoj el tiuj landoj ne devus studi fremdajn lingvojn, ĉar tio estas por ili malavantaĝo.

Ambaŭ virinoj lernis danci slovakan dancon „tango“, helpis elkrei slovakan kaj mondan rekordon pri 172 dancantoj sur unu loko. Ĉe la reveno de la placo ludis juna slovaka akordenisto ĉeĥajn kaj moraviajn kantetojn laŭ ilia deziro, la sveda esperantisto pruntis violonon al la ĉeĥa amiko kaj revenantaj homoj de Japanio ĝis Brazilo helpis kanti aŭ almenaŭ aŭskulti. Ĝi estis belega spontana finiĝo de la tuta semajno.

La raporton kaj fotojn sendis: Lenka Angelová, Věra Štěpánová, Milada Zemanová kaj pluaj, kompilis Jarmila Rýznarová.

# La 68-a Internacia fervojista Esperanto-kongreso 21 – 28-an de majo 2016

La ĉi-jara IFEF-kongreso okazis sur la balkana duoninsulo en Bulgario. La kongresejo troviĝis ĉe la bordo de la Nigra maro proksime de Varna en ripozkomplekso »Sanktaj Konstantin kaj Elena» kun vizitinda samnoma monaĥejo.

La programo de la kongreso okazis en la domo de sciencistoj, kiu funkciis ankaŭ kiel hotelo. Pluraj esperantistoj loĝis en apudaj hoteloj malpli kostaj kaj pli bonaj. Kelkaj bulgaroj ĉeestis nur partotempe.
La ĉefaj organizantinoj Petja Aleksandrova kaj Veselka Kamburova komisiis eventorganizan oficejon, kies prizorgantinoj vere tre kompetente zorgis pri nia bonfarto kaj dum la tuta aranĝo ili ĉiam ĉeestis. La kongreson partoprenis pli ol naŭdek esperantistoj el dek du landoj. Ĉeestis gastoj el Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Pollando kaj Rumanio.



Post la inaŭguro reprezentantoj de ĉiuj menciitaj landoj plantis diverskolorajn rozojn en la ĝardeno antaŭ la kongresejo. La rozo simbolas Bulgarion. Oni povas aĉeti vastan gamon da produktoj faritaj el ĝi; ĉefe parfumojn, kosmetikaĵojn, sed ankaŭ marmeladon, mielon, likvoron, diversajn dolĉaĵojn, memoraĵojn kaj vestaĵojn kun rozmotivoj. Ankaŭ en niaj kongres-sakoj ne mankis memoraĵoj kaj rozparfum-flakono en bele dekoraciita ligna ujo.

Agrabla surprizo atendis nin antaŭ la inaŭguro. Folklorvestita kantistino Kalinka Raĉeva proponis al ĉiu alvenanto bulgaran panon kun spicaĵo kaj ĉiuj ricevis donace ceramikan ujeton kun Esperanto-surskribo por memori la kongreson. Ni tostis per la konata bulgara brando Rakija. Dum la inaŭguro, kiel kutime okazis paroladoj kaj salutadoj de unuopaj landaj asocioj kaj aliaj instancoj. Ne mankis festparolado de la prezidantino de IFEF Rodica Todor, kiu ĉe la fino malfermis la kongreson. Post tio ni fotiĝis antaŭ la kongresejo.

La temoj de la kongreso estis bone pritraktataj. Temis pri: «La fervojo de la estonteco» kaj «La lingvoj kiel rimedo». La programo enhavis kunsidojn de la IFEF estraro, laŭtemajn konferencojn, kunsidojn de la faka komisiono, fakprelegetojn kaj la plenkunsidon. Oni parolis pri movadaj aferoj, pri statut-ŝanĝoj. Kunvenis terminara kaj fake aplika sekcioj. Estis prezentitaj estraraj raportoj de la sekretario, redaktoro kaj kasisto. Por sekvaj tri jaroj ekfunkcios nova estraro, kiun oni surloke elektis. Verdire ne estis ŝanĝo, prezidanto daŭre estas Rodica Todor, sekretario Vito Tornillo, kasisto Laurent Vignaud, nur elektiĝis nova redaktoro Guido Brandenburg pro demisio de István Gulyas.



Ne mankis alloga prezento pri la venontjara IFEF-kongreso en Colmar (Francio) kaj elekto de Pollando por la jaro 2018. Estis honorigitaj kelkaj elstaraj esperantistoj pro ilia poresperanta laboro. Restis tempo por promenoj en la ĉirkaŭaĵo, aŭ laŭ la marbordo. Tamen ne multaj kuraĝis bani sin en malvarma maro. Pluraj profitis sunan veteron por sunumado. La 24-an de majo bulgaroj festas Kirilon kaj Metodon, inventistoj de la kirila skribo.

Ni ĉeestis kaj spektis la paradon de diversaj lernej-grupoj, sport-organizoj, intelektuloj, profesoroj, muzikistoj, maĵoretinoj, (uniformitaj knabinoj) maristoj ktp. Homoj bele kaj feste vestis sin, portante bulgarajn flagojn kaj florojn.



Infanoj svingis per flagetoj aŭ per koloraj blovbalonetoj. Adoleskuloj portis kaj montris diversajn banderolojn aŭ portretojn de Kirilo kaj Metodo. El laŭtparolilo sonis anoncoj pri ĵus preterpasantaj grupoj. Ambaŭflanke de la trotuaroj staris homoj aplaŭdante kaj svingante per floroj aŭ flagetoj. Bela suna vetero kontribuis al entuziasmo kaj ĝojo.

Ŝajnis, ke la manifestacio ne havos finon, ni pasigis tie la tutan matenon. La kongresaj vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Dum la Interkona Vespero kantis por ni la fama bulgara kantistino Violeta Balkanska kaj alia talenta kantistino Kalinka Raĉeva. Ankaŭ dum la nacia vespero ni ĝuis kantojn kaj folklorajn dancojn kaj kundancis. Alia danceblo prezentiĝis dum la Esperanto-vespero. Impona estis adiaŭa vespero kun festa vespermanĝo, kiu okazis en apuda bulgarstila taverno «Kopitoto». Vigla muziko animis la vesperon kaj instigis al plua dancado.

Dum la vespermanĝo ni spektis folklorajn dancojn kaj kantojn, viziton de amuza azeno kaj eksteran dancmarŝon sur ardantaj karboj. Okazis du duontagaj ekskursoj: al Varna kaj al Nesebâr. En Varna ni vizitis la pramstacion kaj porvizitantan centron kun maketo demonstranta la tutan komplekson.
Poste ni iom trarigardis la urbon kaj la ekskurso finiĝis en vinkelo, kie ni gustumadis kelkajn specojn de bulgaraj vinoj kun eblo aĉeti

ilin. En Nesebâr ni admiris antikvan urbon, kelkajn preĝejojn kaj fortikaĵajn murojn. Ĉe la marbordo ni nutris mevojn.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la mezepoka kaverna monaĥejo Alaĝa kaj muzeo. Poste ni veturis al la urbo Balĉik kaj promenis en ties botanika ĝardeno admirante belegajn multkolorajn rozojn. Impresis somera rezidejo «La palaco» de la rumana reĝino Maria kaj apuda minareto, de kie oni vidas la maron. Laste ni vizitis la kabon Kaliakra dum pluvega vetero.
La postkongreso okazis en Veliko Tarnovo. Dum la solena fermo estis transdonita la IFEF-flago al francaj reprezentantoj de la venontjara 69-a IFEF-kongreso okazonta de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2017. Ĝis revido en la pitoreska alzaca urbo Colmar.

*Liba Gabalda*

# Dum Festivalo Woodstock WOŚP en Kostrzyn Odra

ĉe Odra rivero okazis en Pollando la 13-16-a de julio 2016

## Multgeneracia Vilaĝo Esperanto

**Celoj**:* Popularigi informojn pri la lingvo, ideo kaj internacia Esperanta socio, instruado – rapida kurso per „senpera metodo", kleriga kurso „Kiel lerni fremdan lingvon" , Infana lernejeto, Kunvenejo Babel-turo, prezentado de filmoj kaj literaturo en Esperanto kaj muzikon.
* Interesigi amasajn ĉeestantojn de Festivalo Woodstock pri eblecoj de mobila kultura, turisma edukado, kiu integras junularon de la mondo. Ebligas tion fenomenaj ecoj de Esperanto kaj universalaj amikaj retoj je E- kunlaboro.
* Krei kondiĉojn por organizaj, teknikaj, programaj eblecoj, de „Esperanto-nestiĝado" ĉe grandega, ĉiujara aranĝo mondskala por junularo (ne nur), kie proponitan de ni agadon, oni povos cikle aperadi en Esperantujo. Kolekti spertojn por jam memstaraj venontaj organizantoj (TEJO, PEJ) en ĉiujaraj editoj de la Festivalo.

* Reala, atrakcia, pozitiva, rimedo por realigi IDEUMADON rapide, per relative malaltaj kostoj kaj grandega atingopovo.

**PROGRAMO:** Ĉiutagaj lingvaj kursoj (2x 1,5 h.) por diverslingvanoj, per „senpera metodo” – instruis Stano Marĉek, aŭtoro de lerno-




libro eldonita en 40 lingvoj (krom eŭropaj en ĉina, japana, armena, barata, taja kaj aliaj). La lecionoj estis ilustrataj per didaktikaj materialoj de aŭtoro kaj atrakciitaj – per kantataj de li kun gitaro E-kantoj. Pluajn informojn pri la programo Vi trovos en
http://www.cem.info.pl/?page_id=1490&lang=de red.

# Nova honora membro de UEA

Petro CHRDLE (Ĉeĥio) naskiĝis en la jaro 1946. Li diplomiĝis kiel elektroteknika inĝeniero kaj doktoriĝis ĉe Instituto pri Elektroniko kaj Radiotekniko de la Ĉeĥoslovaka Akademio de la Sciencoj. Chrdle estis estrarano de Ĉeĥa E-Asocio 1987-2011, i.a. prezidanto 1987-1993, kaj fariĝis ĝia honora membro en 2008. Rajtigita ekzamenanto de UEA/ILEI, li verkis kun sia edzino Stanislava (1954-2000) la lernolibrojn“ Esperantem za tři měsíce“ (Per E-o dum tri

monatoj; 1995, 3-a eld. 2006) kaj „Esperanto od A do Z "(E-o de A ĝis Z; 2016).

Li verkis „Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj“ (1995; 3-a eld. 2013) kaj redaktis i.a. la prelegarojn „La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto“ (1995) kaj „Intimaj temoj en la Esperanto-beletro“ (2005). Docento de AIS, li oficis kiel ĝia senata sekretario 1990-1994.



Li estis komitatano de UEA 1987-2010 kaj estrarano pri faka kaj scienca agadoj 1998-2001. En 1992 li fondis la kongresan kaj klerigan agentejon eldonejon KAVA-PECH, sub kies ŝildo li fariĝis unu el la plej gravaj nuntempaj E-eldonistoj. Li eldonis pli ol 170 titolojn, i.a. tri en la serio „Oriento-Okcidento", kaj eĉ pli grandan nombron por klientoj en- kaj eksterlande. Li organizis ankaŭ ses Konferencojn pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (KAEST; 1998-2008).

Transprenite el gazetara komuniko de UEA

La redakcio de AEH al Petro sincere gratulas ! jary

## Ondina malbeno

La labradora hundo gardas malgrandan knabeton Toĉjon kontraŭ Ondina malbeno. Tiu ĉi malsaniĝo trafis la knabeton el la urbo Ostrava ĉe naskiĝo. Se li ekdormos, li ĉesos spiri.

Batali kun tiu ĉi rara nerva malsaniĝo nun helpas al la dujara knabeto kaj al la tuta familio krom specialaj kuraciloj ankaŭ ekzercita (dresita) hundo, kiu estas la unua hundo en Ĉeĥa respubliko, kiu scipovas reagi je signalo de pulma ventilatoro.
Toĉjo vivas kun CCHS (ĝi estas kongenitala centrala hypoventila sindromo, kiun havas en nia lando nur aliaj du pacientoj en la regiono de Hradec Králové). Laŭ la kuracistoj la malsaniĝo estas denaska, vivodaŭra, kaŭzita per gena mutacio.

Por la gepatroj tio signifas adapti la tagon al la knabeto, ĉefe gardi, kiam li ekdormetas, konekti lin al ventilatoro – diras la patrino de Toĉjo. Ŝi, kiu havas ankoraŭ du infanojn, devis forlasi lokon de instruistino. Ili transloĝis de la vilaĝo el Valaĥia regiono al urbo Ostrava, ke ili estu pli proksime al medicina prizorgado.
La kuracistoj timas, ke la knabeto estos aŭtisto, ĉar tio ĉi estiĝas ĉe 20 procentoj de la malsaniĝo.

Pri ĝi kaj pri dresitaj hundoj la familio estis informita el USA, sed en nia lando neniu volis hundojn dresi por tiuj kurac-celoj. Poste ŝi ricevis adreson al societo de gvido-hundoj en Brno. La estro de la societo vizitis tiun ĉi familion, li surbendigis la signalon de ventilatoro kaj komencis dresi la hundon. Tio daŭris tutan jaron.



Fine malgranda Toĉjo havas hundon, kiu aŭdas je la nomo Gudy. Knabeto dormetas kelkfoje tage, Gudy estas senĉese ĉe li kaj gardas. La patrino diris: Se eksonas la sono de la signala problemo kun spirado, la hundo tuj estas ĉe mi. Se mi dormas, ĝi vekas min. Por sia deĵoro ĝi ricevadas frandaĵon. La hundo estas tre karesema, ĉiuj infanoj kaj ni ŝatas ĝin. La patrino diris: mia deziro estas, ke mia filo povu plej multe memstariĝi kun helpo de la hundo, por ke Toĉjo povu mem dormi en sia ĉambro.

Kial oni parolas pri malbeno?
Temas pri paralela nomo por kongenitala centrala hipoventila sindromo (naturdevena cerba misfunkcio de spirado, ĉeĥe: vrozená mozková porucha dýchání), kiu ligiĝas kun malnov-germana legendo pri la akva nimfo Ondina. Ŝi ekamiĝis en ordinaran homon kaj naskis

al li infanon, sed la amanto, kvankam ĵurante al ŝi fidelecon ĝis sia lasta elspiro, ŝin perfidis.
La nimfo damnis lin kaj diris: Spiru tiel longe, kiel vi eltenos esti maldormanta. Kiam vi foje ekdormos, vi mortos.

El la ĉeĥa ĵurnalo tradukis jary

## Tristaj anoncoj:



Fine de julio forpasis la multjara membro de AEH **Kurt Langer** el Dresdeno (*1920). Kvankam dum la mondmilito per la bombo li perdis ambaŭ krurojn kaj vivis nur kun protezoj, lia moviĝemo kaj intereso pri ĉio estis mirinda. Mi ne povas forgesi, kiel en SET Lanĉov antaŭ jaroj li noktis kun sia edzino en la tendo, kiu estis disfaldita sur la tegmento de ilia aŭtomobilo Trabant.
Ankaŭ en la lago li tie naĝis neimageble rapide. Restas al mi nur rememoroj.
Plua nia fidela membrino **Věra Muchnová** el la urbo Strakonice devis forlasi tiun ĉi mondon la 5-an de aŭgusto 2016 (* 1955).
**D-ro Detlev Blanke,** unu el la plej renomaj nuntempaj germanaj interlingvistoj forpasis la 20-an de aŭgusto en Berlino. (*1941). Li estis multjara sekretario de Kulturligo de GDR kaj prelegis en multaj E.-renkontiĝoj. Honoron al iliaj memoroj. red.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.